Raporto pri 100a UK

Ĉi-jare okazis jubilea 100a UK en Lille, norde de Francio. Abunda kongresa programo ebligis nin sperti multon dum lasta semajno de julio 2015.

Dum la kongreso mi ŝatis speciale koncertojn de diversaj ensembloj. Okazis multaj, do ne eblis patortopreni ĉiujn pro aliaj programeroj. Mi ĝuis koncerton inter alie de nederlanda duoblo Kajto kun kiu ĉiuj kantis, ankaŭ dum kantoatelieroj, belajn kaj amuzajn kantetojn kaj kanonojn (t.e. formoj de polifonio, kie la temo de unu voĉo estas imitata de unu aŭ pluraj pliaj voĉoj post difinita tempospaco; la unua grupo komencas, kaj kiam ĝi ekkantas la duan verson de la kanto, la dua grupo ekkantas la unuan verson ktp). Malgraŭ sia eta longeco (aŭ pli precize mallongeco), kutime nur kelkaj linioj, la kanonoj de Kajto havas signifoplenan enhavon. Tre plaĉis al mi ankaŭ koncertoj de ensemblo Getch Gaëtano t.e. junaj francanoj kiu belege ludis modernan muzikon kaj kantis ankaŭ esperantlingve. Kun plezuro mi aŭskultis koncertojn de ASORTI el Litvio, JOMO – legenda franca muzikisto kaj poligloto kiu ĝojigis nin per sia multstila muziko, kaj Junaj Voĉoj el Pollando kiuj prezentis belan popolmuzikon. Kun plezuro mi ĝuis ankaŭ teatrludojn inter alie „Ĉagrenegoj”.

Vizitante Lille surprizis min soldatoj kun armiloj kontrolantajn stacidomon kaj metroon kaj malpermeso fari fotojn ĉe publikaj lokoj.Tio ŝajne estis rezulto de plialtigita nivelo de sekureco post lastatempaj teroristaj atakoj okazintaj en la lando. Sed samtempe ni estis agrable surprizitaj de amikeco de lokaj homoj kiuj ofte volis helpi al ni. Ekzemple kiam ni promenis tra la urbo kaj eltenis mapon por trovi lokon tuj iu alproksimiĝis kaj demandis kien ni ŝatus veni ĉu eble ni bezonas helpon. Tia helpemo kutimas inter geesperantistoj dum kongresoj sed ĉi-tie lokaj francaj loĝantoj agis sammaniere. Por mi tio estis bona ebleco por praktiki francan lingvon.

Dum unua tago kiam ni venis al Lille ĉe stacidomo atendis francaj esperantistoj kiuj sciigis nin kien iri kaj helpis aĉeti tutsemajnan bileton kun rabato en proksima agencio. Tio rabato ne eblus se ni mem volus aĉeti biletojn ĉar ni devis doni adreson troviĝantan en Francio. Dankon al francaj esperantistoj por ilia helpo!

Kelkaj tagoj poste mi agrable spertis, ke Esperanto ne nur estas “fenestro al la mondo” sed ankaŭ “malfermas pordojn”. Kune kun mia amiko Princo Henriko el Niĝerio, kiu antaŭe vizitis nian urbon Krakovon (intervjuon kun li eblas aŭskulti ĉe jena retpaĝo: http://esperantujo.cba.pl/renkontoj/), ni venis kun etaj dorsosakoj al vendejo en Lille por aĉeti ion por trinki. Ja estis somero kaj post kelkaj iomete pluvaj tagoj fariĝis varme kaj ni sojfis. Tamen, sekurgardisto de la vendejo malpermesis al ni eniri. Li tuj haltigis nin ĉe enirejo kaj postulis ke ni montru kion ni portas en dorsosakoj. Li volis ankaŭ scii de kie ni estas kaj aliajn detalojn. Sed kiam li ekvidis, ke ni havas etikedojn de kongreso de Esperanto pendantajn ĉe niaj koloj li tuj ŝanĝis sian sintenon. Ankoraŭ li interŝanĝis kun ni kelkajn frazojn pri niaj devenlandoj inter alie li demandis Princon Henrikon ĉu nun estas trankvile en Niĝerio, menciante teroristojn de Boko Haram, sed sen plua kontrolo li permesis nin eniri la vendejon. Dank' al niaj Esperanto-kongreso kartoj.

Lokaj homoj, kiujn ni renkontis, estis tre amikecaj. Laŭ mia sperto en norda Francio homoj vere estas tiel simpatiaj kiel prezentite en amuza komedia filmo “Chti” (titolo foje tradukata kiel “Pli norden ol la Nordo”). Mi nur domaĝas, ke mi ne aŭdis ilin parolatan sian dialekton “Chti” kiu devas esti populara se eĉ loka biero portas tian nomon.

Dum unu tago serĉante eblecon tagmanĝi bone sed ekonomie mi kaj mia edzino Markéta alproksmiĝis al unu restoracio, apud kiu ni hazarde renkontis esperantistinon, kiu ankaŭ volis tagmanĝi. Tio estis bonega koincido ĉar tiumaniere ni ekkonatiĝis ku agrabla francino Mari-Do (Marie Dominique), kiu same kiel ni ŝategas pasi tempon en montaroj. Ŝi interese rakontis pri Pirenejoj, montaro kiun ni esperas iam viziti.

Alitage tagmanĝante en loka restoracio ni gustumis je unua fojo „moule” en nigraj ŝeloj. Tio estis iel eksterordinara manĝo por ni kaj tre bongusta! Poste mi aĉetis poŝtkartojn kun recipo (priskribo) kiel prepari diversajn lokajn manĝojn de tiu-ĉi regiono, interalie „moule” kaj kukon kun fromaĝo. Markéta estas specialistino pri bakado de kukoj do mi esperas, ke mi baldaŭ havos ŝancon gustumi ankaŭ ĝin.

Kelkfoje ni ankaŭ bierumis vespere kun diverslandaj esperantistoj kaj mi estis surprizita de bongusta alkoholaĵo vendata tie. Tamen, plej plaĉis al mi interparolado kun diverslandanoj. Mi renkontiĝis kun geesperantistoj el multaj

landoj inter alie el Francio, Belgio, Finnlando, Svedio, Ukrainio, Rusio, Germanio, Nederlando, Austrio, Ĉeĥio, Slovakio, Niĝerio, Vjetnamio, Japanio, Hispanio kaj aliaj landoj. Al la kongreso venis kelkaj miloj da partoprenatoj el 80 landoj.

Dum nacia vespero kun plezuro mi vizitis standojn de diversaj landoj. Tre plaĉis al mi bonege eldonitaj libretoj kaj folioj pri Slovakio kaj pri venonta Universala Kongreso. Bongustis ĉokolado de UK en Nitra kaj kelkaj glutoj da slovaka vino disdonataj de slovakaj esperantistoj ☺ Dankegon!

Ĉar kongresa programo estis riĉa mi kaj Markéta partoprenis diversajn programerojn. Unu tage Markéta alvokis al mi dirante, ke ŝi ĵus renkontis esperantiston en kongresojo, kiu same kiel mi estas ano de klubo Toastmasters International kaj ŝatus ekkonatiĝi kun mi. Tiumaniere mi ekkonis Guido-n el Belgio, kun kiu mi poste partoprenis interesan prelegon de Humprey Tonkin (rektoro de universitato en Usono, iama estrarano de UEA) pri la arto paroli publike. Post la prelego ni interŝanĝis konsilojn kaj proponis eblan ekfunkciadon de klubo simila al TI sed en Esperanto. Kluboj de tiu non-estrara organizo helpas trejni paroladon antaŭ publiko kaj funkcias en diversaj landoj kaj en diversaj lingvoj, tamen verŝajne ankoraŭ ne en la internacia lingvo. Estimata preleganto, konata de sia oratoreco, poste proponis al mi tralegi "Retorikon" de Ivo Lapenna. Mi volonte aĉetis ĝin en libroservo kaj kun intereso nun legas la libron.

Dimanĉe kune kun aliaj kongresanoj mi ĝuis belan muzikon dum ekumena sankta meso okazinta en malnova preĝejo de sankta Maurico en Lille. Poste ni promenis apud Belfroi – plej alta turo, kiu tipe staras en gravaj urboj de Francio. De tia turo oni ofte aŭdas belan muzikon de kariljono (ludon de sonoriloj).

Plaĉis al mi instruado de franca lingvo ekspreseKun franculino Meva kaj nederlanda instruisto Sylvain Lelarge. Poste Franjo el Aŭstrio helpis al mi pri la lingvo instruante konjugacjon de bazaj verboj. Tiumaniere lernante francan lingvon mi ekkonatiĝis kun kelkaj esperantistoj de diversaj landoj. Tre gravis por mi sperto uzi la francan lingvon sur strate, en vendejoj, ĉe stacidomo, en muzeoj, demandante pri vojo ktp. Okazis kelkaj amuzaj situacioj dank'al kiuj mi lernis ion novan pri la lingvo. Komence de kongreso iomete pluvis sed kelkaj tagoj poste revenante el Belgio kien ni estis ekskursantaj ni eniris buson atendintan nin sub brilanta de longe suno. Estis varmege enen kiam ni eksidis. Do mi alproksimiĝis al

ŝoforo kaj demandis franclingve pri ebleco malkreskigi temperaturon. Ĉe li estis agrable malvarme, kontraŭe al alia parto de la buso. Post mia peto li jesis. Do mi revenis al mia sidloko je fino de la buso. Tamen, mi sentis neniun ŝanĝon de temperaturo, estis daŭre varmege. Do post pli malpli 10 minutoj mi denove alproksimiĝis al ŝoforo kaj demandis ĉu la "aerkondicio" ne funkcias? Kia estis mia surprizo, kiam sidanta apude Heidi el Belgio, respondeculino pri ekskursoj, klarigis al mi, ke mi antaŭe demandis franclingve pri plivarmigo de temperaturo kaj ne kontraŭe! Malbonŝance por mi erare mi petis ŝoforon "ĉu eblas varmigi aeron". Situacio baldaŭ fariĝis klara, temperaturo malplialtigita sed tiu maniere mi finfine lernis diversecon inter francaj vortoj sigifikantaj "varma" kaj "malvarma" kiuj estis novaj por mi tiam. Dank' al tio mi jam scios ilin ĝuste por eterne ☺

Tre interesa estis ateliero pri Aikido dum kiu mi ne nur eksciis detaloj pri tiu batalarto (aŭ eble pli precize pri defendarto ĉar en Aikido oni ne atakas sed uzas forton de atakanto por venki ŝlin) sed ankaŭ praktikado kiun mi spertis kun staranta apude esperantisto el Japanio.

En libroservo mi trovis multajn legindajn librojn kaj aĉetis kelkajn. Ekinteresiĝis min interalie "Ok jaroj de vojaĝado" sed bedaŭrinde lastan ekzempleron oni vendis antaŭ mi alproksimiĝis al kaso. Poste en ĉambro apuda kun granda intereso kune kun grandega publiko mi rigardis filmoraporton de la aŭtoroj de la libro pri ilia vojo (pilgrimado) al Santiago de Compostella. Jam kelkfoje mi aŭdis de geesperantistoj kaj aliaj homoj pri tiu vojo laŭ itinero de sankta Jakobo markita per ŝeloj kaj iam mi mem ŝatus provi trairi ĝin. Inter vendataj libroj kiuj kaptis mian atenton troviĝis kelkaj krimromanoj. Tiuj je feliĉo mi sukcesis aĉeti kaj nun legas.

Mi volis ankaŭ partopreni prelegojn pri diversaj regionoj de Francio sed ili estis tiom popularaj inter esperantistaro, ke bedaŭrinde eta prelegĉambro pleniĝis rapide kaj mankis liberaj lokoj. Dum jubilea UK oni povis vidi  ankaŭ interesan prelegon de Edmond Plutniak sub titolo "Eta Pollando en Francio": https://youtu.be/GRmXn2w8M9E

Al mi kaj Markéta plaĉis ekskursoj al vizitindaj lokoj. Bedaŭrinde mankis tempo por viziti ĉion. Kune kun aliaj geesperantistoj ni visitis belegan Bruĝon t.n. Venecion de Nordo en Belgio kie oni veturas per boato tra multaj akvokanaloj, kie troviĝas belaj domoj de diverstila arkitekturo, Belfroi turo, kie oni produktas

bongustan ĉokoladon, waflojn, kaj pomfritoj pri kiuj Belgoj fieras. Markéta ĝuis ankaŭ viziton al Dunkerko apud maro kune kun aliaj esperantistoj. Post kongreso ni ankoraŭ vizitis galerion de arto en Louvre-Lens kaj renkontis tie du aliajn geesperantistojn. Revenante hejmen tra Belgio ni vizitis Namur, ĉefurbon de regiono Wallonia, kie troviĝas citadelo kaj ni ĝuis boatumadon tra rivero apud bela ĉirkaŭaĵo tie. La urbo situas sur la itinero de sankta Jakobo al Santiago de Compostella markita per ŝeloj. Ĉeokaze veturante al Namur en matena trajno al Tornai ni renkontis tiam kelkdekojn de gejunuloj irantajn post UK partopreni IJK-on en germana urbo Wiesbaden. Poste ni revenis per malmultekosta aviadilo el prokisma Charlroi apud Bruselo al Kraków.

La kongreso estis partopreninda. Mi nur domaĝas, ke ĝi daŭris nur unu semajnon ĉar ankoraŭ multajn aferojn ni povis sperti tie, multaj lokoj restis por viziti kaj mi volis ĝui renkontojn ankaŭ kun aliaj simpatiaj geesperantistoj. Programo estis abunda kaj ne eblis partopreni ĉion sed tion kion mi spertis donis al mi bonajn impresojn. Okazaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj rapide elĉerpiĝis sed ni sukcesis aĉeti kaj sendi almenaŭ la kelkajn. Mi renkontis multajn amikojn kaj ekkonatiĝis kun aliaj geesperantistoj. Domaĝe, ke ni ne faris komunan foton antaŭ kongresojo. Espereble tian foton oni povos fari dum venonta kongreso en Slovakio.

Laŭ mi interesa estis inter alie prelego de Humphrey Tonkin (rektoro de universitato, iama estrarano de UEA) pri la arto paroli publike:
Parto 1a: https://www.youtube.com/watch?v=bYC-RdZV4qI
Parto 2a: https://www.youtube.com/watch?v=ydU1K1QWlIc
Parto 3a: https://www.youtube.com/watch?v=Tg8EbyiJ3b0
Parto 4a: https://www.youtube.com/watch?v=QUs1ERqofXA
Ĉu vi rekonas min enirantan ĉambron je komenco de unua parto kaj demandantan preleganton meze de tria parto? mi eĉ ne sciis, ke ili faris filmraportojn pri tiu prelego)

Kaj jen aliaj filmetoj pri UK 2015:
https://www.youtube.com/results?search_query=UK+2015+Lille+esperanto

Amike,
Adam Wilkus